

bulgara esperantisto


MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO
Rekomendita de la M-rio de publika instruado per cirkulero № 5677 de 3. II. 1938

JARO XXII

SOFIA

MARTO KAJ APRILO, 1941

3-4



Dobri Hristov,

eminenta bulgara komponisto, naskita je la 14. de decembro 1875 en Varna, mortis la 23-an de januaro 1941, post 45 jara glora socia kaj muzika agado. Li estas aŭtoro de belegaj kantoj en la stilo de la bulgara popolmuziko, de du ortodoksaj mesoj kaj de multaj muzikologiaj verkoj. Ni publikigas en tiu ĉi n-ro de nia revuo unu el la plej karakteraj bulgaraj popolkantoj, aranĝitaj de li por soprana voĉo kun akompano de piano.

Ne ploru knabineto

Bulgara popola kanto

Dobri Hristov

Andante doloroso. ♩ = 132.

PIANO.

The first system of piano accompaniment consists of three staves. The top staff is a treble clef with a key signature of one sharp (F#) and a 3/8 time signature. The middle and bottom staves are grouped as a grand staff. The music begins with a piano (*p*) dynamic. The bass line features a steady eighth-note accompaniment with occasional triplets, marked with 'Ped.' and asterisks. The treble line has chords and melodic fragments.

The second system continues the piano accompaniment with similar textures in both treble and bass staves, maintaining the *p* dynamic.

mf

1. Ne — plo — ru, ————— kna — bi — ne — to. ne ————— ĝe — mu,
 2. Ki — el ne ————— plo — ri, ki — el ne ————— ĝe — mi

The third system contains the vocal melody and piano accompaniment for the lyrics. The vocal line is on a treble clef staff, starting with a mezzo-forte (*mf*) dynamic. The piano accompaniment is on a grand staff, starting with a piano (*p*) dynamic. The lyrics are in Esperanto and are aligned with the notes of the vocal line.

Ne ŝu - tu e - tajn san - gajn lar - me - rojn, ne ŝu - tu e - tajn san - gajn
 Ki - el ne ŝu - ti san - gajn lar - me - rojn, Ki - el ne ŝu - ti san - gajn

lar - me - rojn.
 lar - me - rojn.

1.-4. 5.
p *ritard*
D.S.

Ne ploru, knabineto, ne ĝemu,
 Ne ŝutu etajn sangajn larmerojn!

Kiel ne plori, kiel ne ĝemi,
 Kiel ne ŝuti, sangajn larmerojn?

Hieraŭ komuniko alvenis
 Ke mia patro estas buĉita.

Kiel ne plori, kiel ne ĝemi,
 Kiel ne ŝuti sangajn larmerojn?

Hieraŭ komuniko alvenis,
 Ke ankaŭ fraĉjo estas buĉita.

Esperantigis St. Ĝ.

Ni kompaktigu niajn kolonojn

Multaj esperantistoj opinias, ke la nuna politika situacio estas nekonvena por vigla esperanto-agado, ke la specifaj objektivaj kondiĉoj de la momento postulas ĉesigon de ĉiu lukto kaj laboro. — Ni do kunrulu nian standardon kaj atendu pli favorajn cirkonstancojn, pli oportunan politikan konjunktur.

Tiu ĉi koncepto estas erara.

„Favoraj cirkonstancoj“ estas fleksebla esprimo havanta tre malsamajn signifojn. Ekzemple, la mondaj krizoj, militoj kaj politikaj katastrofoj estas danĝeraj, eĉ fatalaj por kelkaj eluzitaj ŝtatoj, por iuj ŝtoniĝintaj sociaj formoj, aŭ por iuj senpripensaj registaroj; kontraŭe, la samaj krizoj kaj militoj estas favoraj, eĉ utilaj por la prospero kaj disvastiĝo de diversaj doktrinoj, religioj, herezoj, sektoj kaj sociaj movadoj. La turmentita homaro, perdante fidon kaj esperon al la ĝisnuna, dioj kaj idoloj, ekserĉos la apogon de novaj idealoj.

Por multaj personoj la frapoj de la sorto estas pereigaj; sed por la fortaj karakteroj la suferoj efikas kiel utila instigilo kiu hardas la spiritojn. Dante skribis la plej belajn versojn dum la mizero de sia ekzilo kaj Beethoven komponis la plej inspiritajn simfoniojn dum la malfeliĉaj jaroj de sia surdeco. Ofte la persekutoj donas ian nekompreneblan, mistikan povon, prestiĝon aŭ ĉarmon al la viktimo kaj la turmentoj preskaŭ ĉiam sanktigas la martiron.

Kun la ideoj kaj kultursociaj movadoj, kiuj estas kolektivaj homaj organismoj, okazas same kiel kun la apartaj personoj. La frapoj de la sorto — katastrofoj, krizoj, militoj, persekutoj — estas efikaj instigiloj kiuj fortikigas la movadojn. La renkontitaj malhelpoj kaj malfacilaĵoj kribras ties adeptojn, eliminis la perfidajn, la profitemajn, la senkuraĝajn aŭ simple la hazardajn „ideanojn“, eltrovas la plej kapablajn, la plej sentimajn kaj la plej honorindajn gvidantojn de la legioj kaj efektivas

tiamaniere la unuecon kaj la disciplinon inter la membroj.

La kristanismo estis plej fortika kaj unueca dum la epoko de la plej kruelaj persekutoj. La „oficialigo“ (vorto tre ŝatata de la esperantistoj!) de tiu ĉi religio signis la komencon de ĝia dekadenco: skismoj, herezoj kaj kvereloj ŝanceligis ĝian aŭtoritaton kaj minacis ĝian unuecon. Saman komparon oni povas far kun multaj aliaj religiaj kaj sociaj movadoj: la nombro de iliaj anoj kreskis tiom rapide pro la reakcio kontraŭ la subpremo.

Tamen, ni devas rekoni, ke en momentoj de sociaj skuoj kaj katastrofoj iuj **neunuecaj** movadoj travivas krizon. Ili grave malsanas kaj riskas dismembriĝi, eĉ pere, se ilia rezistpovo ne estas sufiĉe forta por kontraŭstari la uraganon de la okazaĵoj.

Nia esperanto-movado nun estas en danĝero ne pro iaj persekutoj nek pro malfavoraj cirkonstancoj, sed ĝuste pro manko de unueco kaj kompakteco en ĝiaj rondo. Malgraŭ la furiozanta milito kaj la neebleco komuniki kun eksterlando, la cirkonstancoj ne estas senespere malfavoraj al utila perseveranta agado. Multaj grupoj kaj societoj hodiaŭ regule funkcias. Ĉesigo aŭ eĉ malplivigliĝo de nia laboro malaltigos la entuziasmon kaj malfortigos la rezistpovon de nia movado ĝuste en la plej grava historia momento.

La unua renkontita malfacilaĵo devas neniel ajn paralizi nian aktivecon, nek estingi nian idealismon. La travivataj suferoj elprovos la fidelecon, la persistemon, kaj multajn aliajn sociajn virtojn de la esperantistoj, hardante ilian forton, kuraĝon kaj rezistpovon. Sed tio ĉi necesigas unu fundamentan kondiĉon: **solidareco de ĉiuj membroj apartenantaj al nia granda rondo familia**. Tial nia ĉefa tasko en la nuna decida momento devas esti la realigo de kiel eble plej granda unueco kaj disciplino en la kadroj de nia movado. Tiamaniere ni asekuros ĝin

kontraŭ dismembriĝo, garantiante ĝian sendependecon, kaj ebligos al ĝi senlimajn perspektivojn de kreskado kaj prospero.

Nur je tiu ĉi kondiĉo la fajra uragano, anstataŭ malhelpi, fortikigos nin kaj ĝi mem preparos la vojon de nia triumfo. Simile al iuj bakterioj aŭ venenaĵoj, kiuj stimulas kaj regenerigas

la kadukajn organismojn, la milito renovigos kaj revivigos nian movadon, forigonte la hezitemajn aŭ ŝancelemajn netaŭgulojn kaj mafermonte la vojon al la fidelaj, idealemaj kaj kuraĝaj pioniroj.

Ni kompaktigu niajn kolonojn!

D-ro ST. ĜUĜEV

HUNGAROJ KAJ BULGAROJ.

Du popoloj,

kies amikecon nutras ne sole parenca deveno, sed ankaŭ rememoroj pri bataoj, en kiuj ili kune sangis dum jarcentoj pro sortkomuneco, nepre devas serĉi konstante rimedojn, kiuj ĉiam pli firmigas la solidarecon inter ili. Du popoloj, kiuj sentas la bezonojn de komunaj intereso kaj kiuj konscie kaj kun reciproka estimo plenumas historian destinon kaj eĉ subkonscie konjektas, ke la estonto denove povos forĝi ilin batalkunuloj, certe devas krei rilatojn inter si, kiuj la amikecon, solidarecon faru pli intimaj, pli senperaj ne nur inter la ŝtatgvidantoj, sed ankaŭ inter la milionoj de tiuj du popoloj.

Ni, esperantistoj de la du najbaraj landoj, posedas la plej taŭgan kaj plej senperan rimedon por estigi rilaton aŭ firmigi jam ekzistantan kooperon tie, kie la kultura kunlaboro estas dezirinda aŭ nepre bezonata inter la unulingvaj intelektuloj aŭ simpluloj de la du parencaj nacioj. Ŝparante monon, energion kaj multe da tempo ni povas esti je la dispono de la gvidantoj respondecaj per la neŭtrala Esperanto kaj per ĝia movado, kiu parte baziĝas en ĉiu lando sur la plej alta moralo de reciproka estimo kaj parte havas sian grundon sur la popola konscio, ĵaluze gardanta sian nacian karakteron kaj samtempe sopiranta konatigi siajn valorojn kaj partopreni en la ko-

muna laboro de la nacioj por pli bona, pli racia estonteco de la homaro.

Estus utile, se niaj bulgaraj gesamideanoj iom post iom per elokventaj faktoj konvinkus siajn bulgarajn gefratojn kaj sekve la bulgaran opinion publikan, ke la kulturvojo de la esperanto-movado kondukos pli rapide kaj pli facile al la celo: vere kaj efektive krei intiman rilaton inter la popoloj bulgara kaj hungara ol kia ajn multtekosta rimedo. Estus agrable, se la gvidantoj de la bulgara movado serĉus kaj trovus oftajn okazojn por kune agi, kune demonstracii kaj kune partopreni en le prepara laboro de la estonteco.

Ni estu firme konvinkitaj, ke bona organizaĵo, tenanta antaŭ si ne sole personajn interesojn, sed obeanta al la prudentaj instrukcioj de respondecaj kompetentuloj, baldaŭ alportos riĉan rikolton, fruktodonan rezulton por la bono de la du popoloj, kies ministroj antaŭ nelonge oficiale konfirmis tiun amikecon, kiu ja fakte ĉiam ekzitis inter ni.

Vivu Bulgarujo kaj ĝi prosperu por propra kaj por paco komuna en Eŭropo!

Julio Baghy,

vicprezidanto de la Esperanto-Akademio.

ORIGINALAJ VERKOJ EN ESPERANTO

Reveno

Mi venas, panjo mia, ter'
 al vi — min logas la odoro
 de via kamp' — mi estas er'
 de la vilaĝanar' labora,

sed for, ĝis nun, de via Brust'.
 Mi volas post plugilo iri
 kaj en varmeco, nuboj, frost'
 plugadi vin, ho tero, ŝiri

la sinon vian. En la man'
 mi tenas longan instigilon —
 ja tiel kampojn por la pan'
 prapatroj plugis, kaj la filo,

mi, ankaŭ . . . Nu! Vi sciu, ter',
 mi venas nun en kampojn viajn
 sciigi fratojn en mizer'
 vivantajn, en bordeloj fiaj,

sciigi ilin pri l'estont',
 pri nova, ĝoja tera vivo:
 vilaĝ-urbana forta pont'.
 Kaj vidu, panjo, primitivan

plugilon ĵetis mi jam for,
 ja mano mia tenas forte
 ja direktilon de traktor'
 kaj kiel uragan' sin portas

al vi, ho panjo-ter', por plug'.
 Ĉar mia sulko estas longa —
 ĝis kien iras vida flug'.
 Ja estas nia tuta mondo,

ja estas nia la estont'.
 Kaj tiam gaje, kun motoro,
 ekkantos mi tra l' horizont',
 kaj ĝojaj kantoj eksonoros.

St. Bobev — Burgas.

ELEKTITAJ PAĜOJ EL LA BULGARA LITERATURO.

DIMITĀR ŜIŜMANOV

Ĉu vi memoras?...

Kapitano Lesurski leviĝis kaj streĉetendis sin. Liaj fortikaj artikoj ekkrakis, kaj la malgranda petrol-lampo reflektis lian grandegan ombron sur la blanka muro de la ĉambreto. Lesurski iom haltis, poste malvigle iris al la fenestro kaj malfermis ĝin. Ekstere estis mallume kaj malvarmete, kaj la malforta flamo de la lampo lumigis nur la striojn de la senĉesa pluvo. Pluvadis delonge kaj tiel obstine, kvazaŭ neniam estis bona vetero. Kontraŭe en malklara ruĝo briletis tra la nebulo la fenestroj de la gardostarejo. Lesurski oscedis, ekvolis fermi, — poste subite sin apogis sur la fenestrobreton kaj ekrigardis eksteren. En la netravedebla mallumo kaj en la bruo de la pluvo estis io eterna kaj trankviliga, kiel la memoro pri pasintaj suferoj kaj ĝojoj, el kiuj restis nur paciĝinta malgajo. Lesurski fermis okulojn kaj sentis kiel tiu ĉi malgajo lin englutis kune kun ĉio ĉirkaŭa. Lia kapo sin klinis malsupren kaj iaj belaj, purpuraj rondoj komencis malrapide sin verŝi antaŭ lia fermita rigardo.

Sed subite la monotona bruo de la pluvo estis fendita seke de du pafoj. Lesurski trankvile delokiĝis kaj prenis la aŭdilon de la telefono. Laŭ la fadeno alflugis raŭka voĉo el la posteno ĉe la limo:

— Ni kaptis du kontrabandistojn, kiam ili pasis al nia flanko. Ankaŭ unu virino estas kun ili.

— Sendu ilin al mi!

Kaj Lesurski sidiĝis kaj ĉiam tiel enreviĝe ekatendis, meze de la dormema senmoveco de la ĉambreto.

Kiam antaŭ la gardostarejo reehis obtuzaj paŝoj kaj voĉoj, li malrapide sin levigis, surŝultrigis la ŝinelon*) kaj eliris.

En la kazerno ehis ekscititaj krioj. Ili tranĉe ĉesis tuj, kiam la kapitano eniris. La subita silento apartigis la tri homojn kiuj sin kuntiris en la angulon gardataj de soldato kun surmetita bajoneto, kaj ĝi me-

tis sur ilin ion obskuran kaj pezan, kapablan ilin dispremi.

Lesurski alpaŝis la kaptitojn. Sed antaŭ ol sukcesi eĉ trarigardi ilin, la du viroj desaltis kaj falis surgenuen. Kaj unu ekparolis petege kaj rapide-rapide, tiel ke apenaŭ kompreniĝis lia miksitaj bulgara-greka parolo.

La kapitano vidis ke la akiraĵo estas sensignifa. Kaj demandis nur, kiu estas tiu ĉi virino kun ili.

— Vendvirino, volis pasi la limon, — interrompente respondis la kontrabandisto.

Kaj aldonis tuj:

— Rusino!

Lesurski tremetis surprizite kaj malfermis buŝon, kvazaŭ volis ion diri. Sed levis ŝultrojn, kvazaŭ respondis al si mem kaj sin turnis:

— En la arestejon! — diris li mallonge.

Tamen antaŭ ol ekiri, ekrigardis ĉirkaŭ si, sulkgigis frunton kaj aldonis neatendite:

— La virinon sendu al mi!

Liaj subuloj ekstremis kaj la fajro en iliaj okuloj obee estingiĝis. La kaptitoj stariĝis kaj pasis preter la kapitano. Li ne ekrigardis ilin kaj eliris. Kiam venis en sian loĝejon, li diris mallaŭte al la servsoldato:

— Oni kondukos virinon. Ci donos al ŝi sin lavi kaj sekigi en cia ĉambreto!

Kaj eniris en sian dormoĉambron. En ĝi estis ĉiam tiel pace kaj dormeme, kvazaŭ nenio estis okazinta. Mallaŭte tiktakis la vekhorloĝo sur la komodo, kvazaŭ ia gnomo senlace laboris en la malluma angulo. Sur la plafono ludis ronda reflekto de la lampoflamo.

Lesurski sidiĝis denove sur la seĝon antaŭ la tablo kaj fermis okulojn. Sed la antaŭa enreviĝemo estis malaperinta desur lia vizaĝo. De tempo al tempo ĝi kuntiris sin pro nedifinita emocio, kiu plifortiĝis, kiam aŭdiĝis ekstere paŝoj kaj mallaŭta flustro, kaj poste — tra la maldika muro al la ĉambreto de la servsoldato — plaŭdo de akvo kaj bruo de vestoj.

*) Ŝinelo=soldatmantelo, kapoto (sen kapuĉo).

La kapitano nerveme leviĝis, ekiris al la fenestro, sed haltis vojmeze. Diris duonvoĉe: „malsaĝaĵoj“, sed ektenis spiradon kaj ekaŭskultis. Transe siblis tolo, gutis akvo, grincis la tabuloj sub malpezaj paŝoj, — aŭdiĝis bruo nekutima, nekonvena por tiu ĉi soleca loĝejo, bruo en kiu estis varmo kaj io hejmeca, iam sopirita kaj delonge forgesita.

Lesurski frotetis frunton kaj denove flustris: „malsaĝaĵoj“. Sed neatendite ekiris al la pordo kaj kriis:

— Metu por kuiri teon!

Kaj dum la servsoldato knaris en la kuirejeto per la primuso*) kaj la vazoj, la kapitano nerveme kaj ŝajne kaŝe metis tukon sur la tablon, ordigis du manĝilarojn, eligis konjakon kaj manĝetaĵojn, kaj, kiam li finis, treme elsopiris, kvazaŭ atendis ion belan kaj ne havis paciencon. Poste ekstaris sendecide, ĉirkaŭrigardis, fermis la fenestron, kurtenis ĝin kaj tra la pordo mallaŭte ordonis:

— Donu la teon!

Kaj kiam prenis la pleton kun la glasoj kaj la tekruĉeto, aldonis:

— Invitu la sinjorinon veni.

Post kelkaj momentoj ekstere oni ekfrapis. Lesurski diris sufokite: „entrez“!

Ekgrincis la malnova pordo kaj sur la sojlon stariĝis la alvokitino. Lesurski ordigis sin, malfermis larĝe okulojn, sed ne povis distingi ŝian fizionomion. Li sentis nur, ke staras antaŭ ia malluma aŭreolo, en kiu trembriletas io treege konata. Poste, iom post iom, la aŭreolo densiĝis, ekhavis karnon kaj el ĝi aŭdiĝis malalta kaj mallaŭta voĉo:

— Vi estas vokinta min.

Lesurski tremetis, ekklakis per la botoj, riverencis kaj respondis ruslingve:

— Jes, sidiĝu, mi vin petas!

Ĝoja ekkrio respondis al liaj vortoj:

— Vi estas ruso?

— Ne, diris la kapitano, sed mi estas vivinta longe en Ruslando.

— Kie, diru, kie? — ĉiam tiel emociite demandis la venintino.

Lesurski nomis la urbon.

— Tie mi absolvis en kadeta korpuso kaj en militlernejo antaŭ la milito, — aldo-

mis li seke, kvazaŭ raportadis. Poste diris:

— Sidiĝu!

Kaj iris al la ŝranketo, ĉar li timis, ke lia gastino rimarkos kiel stulte kaj infanece tremas pro emocio liaj lipoj kaj manoj. Sed ne sukcesis atingi ĝis la ŝranketo. Ĉar la virino sin lasis peze sur la seĝon ĉe la tablo, kovris okulojn kaj obtuze elĝemis.

— Kio estas? — timigite demandis Lesurski kaj ekkuris al ŝi.

Ŝi unue ne respondis, kaj poste levis vizaĝon kaj diris tra larmoj:

— Mi estas el la sama gubernio, kaj ĉiuj miaj parencoj loĝis en la urbo, kie vi studis. Ni eble estas nin renkontintaj ie kaj nun renkontiĝas duan fojon ĉi tie, ĉe tiuj ĉi cirkonstancoj.

Tiam Lesurski vidis ion, kion li ne estis rimarkinta: ke, antaŭ ol eniri, ŝi maldelikate estas sin pudrinta kaj ruĝiginta, kvazaŭ ne povis ekpensi, ke oni ŝin vokas por alio. Tio subite lin trankviligis. Ĝi permesis al li pririgardi ŝin pli atenteme.

Ŝi estis je lia aĝo, verŝajne. Sed jam velkinta pro multaj mankoj kaj pro ĉio pasinta. Kaj temen, tra ĉio, kion la vivo estis amasiginta sur ŝin, briletis, aŭreolis tio, kion li estis ekkaptinta antaŭ nelonge en sia gastino — la konatan, la mildan vizaĝon, — la movojn, la manierojn de la rusa virino.

Kaj neatendite Lesurski jesis per kapo kaj diris enpenŝiginte:

— Jes, eble ni estas nin renkontintaj ie kaj nun renkontiĝas duan fojon.

— Diru, elkriis la virino, ĉi vi memoras la grandan balon ĉe la guberniestro, — du jarojn antaŭ la milito? Tiam estis invititaj ankaŭ junkroj. Tiutempe vi batalis kontraŭ la turkoj kaj la bulgaroj estis je honoro. Mi memoras, — oni parolis pri unu, kiu ŝajnis estinta tre interesa, sed mi ne povis lin vidi, tiom da homoj estis en la balo.

— Jes, — respondis Lesurski malrapide — mi memoras tiun balon. Ni estis kvarope invititaj por ĝi.

— Eble vi estis la interesa bulgaro? — elkriis la virino kaj lin alrigardis. Sed interrompis sin kaj flustris: Dio mia!

*) primuso = petrola kuiraparato, kuirilo.

La kapitano jesis faciele per kapo:

— Jes, tiun ĉi vundon mi ricevis dum la milito. La lanco de rusa kozako ĝin enbatis en min!

Kaj li promenis la manon sur sia kurbigita kaj malbeligita vango kvazaŭ la vundo ankoraŭ doloris al li. La virino kulpokonscie ekrigardis lin kaj mallevis okulojn.

— Nenio, diris Lesurski, la vivo ne estas romano. Ni trinku teon...

— Natalio Petrovna — sufloris la gastino.

— Ni trinku teon, Natalio Petrovna — daŭrigis Lesurski kaj sidiĝis. — Kaj ĉu vi memoras la grandan paradon, kiam venis la imperiestro? Ĝi estis dum majo, la tilicj de la bulvardo Pirogovskij floradis, kaj en la bakejo de Artemjov oni preparis tiajn bongustajn kukojn.

— Kiel ne memori! Tiam mia patrino kondukis min ĉe Berger kaj mendis por mi mirindan helbluan jupon. Antaŭvespere ni revenis per fiakro en nian bienon kaj la suno tiel bele brilis inter la trunkoj de la betula arbareto ĉe Gorjanskoje. Ĉu vi konas tiun lokon? Ĝi estas inter Artinsk kaj Glebovo, tie kie la rivero kurbas subite kaj superakvigas la riverherbejojn de la bienoj de Filipovi.

Lesurski fermis okulojn kaj balancis kapon.

— Mi konas ĝin. Dum la somero mi estas irinta tien por fiŝkapti. Maldekstre estas la fabrikejo de Filipovi, kaj dekstre vidiĝas Glebovo, kun la oraj kupoloj de la preĝejo.

— Jes, diris Natalio Petrovna, ni bone konis la familion Filipovi. Kiajn tagmanĝojn donis ili! Filipov estis ĉefo de la nobelaro, kaj mia patro — prezidanto de la pacigaj juĝperantoj. Kaj Filipov ĉiam diris al mia patro: „Petro Sergeiĉ, kial mi ne havas filon, por lin edzigi al via Nataŝa?“ Mia patro ridis kaj respondis: „Nenio, Egoro Kuzmiĉ, estas tempo, vi kaj via edzino estas junaj, kaj Nataŝa povas iom atendi!“ Kaj ni dumtempe interrigardis kun Mitja Smirnov, mia unua amo.

— Smirnov? demandis Lesurski. Unu Smirnov estis mia kunlernanto en la junkra lernejo.

— En la junkra lernejo studis la frato de Mitja. Nigreta, kun veruko sur la vango. Mitja estis pli alta kaj pli belstatura. Ah, kiajn vesperojn mi pasigis kun li en la ĝardeno de Filipovi! Ni ekiradis laŭ la larĝa aleo al la pavilicno. Ĉirkaŭe — malumo; nur noktoj traflugas kaj la griloj trilas. Kaj sur la ĉielo ludas lumetoj. Mitja estas kaptinta min sub brako kaj flustras al mi ion. Kaj mi ne aŭskultas, sed nur fandiĝas kaj ne scias kien ni iras.

Natalio Petrovna elsopiris peze kaj aldonis duonvoĉe:

— Kaj kiam ni revenadis, trinkis tian bongustan framb-cidron!

— Diru, Natalio Petrovna, demandis subite Lesurski — ĉu vi ne estas koninta unu fraŭlinon, — Valentino Perskaja? Ŝia patro estis membro de la tribunalo.

— Kombreneble, mi ŝin konas, vigle respondis Natalio Petrovna.

— Ŝi havis tiajn belajn blujajn okulojn kaj blankan vizaĝeton, daŭrigis Lesurski, kvazaŭ ne aŭdinte. Kiam mi vidis ŝian brunan gimnazianan pelerineton, mia koro eksaltadis kaj ĉesadis bati. Mi ŝin renkontadis ĉiun dimanĉon ĉe la katedralo Arĥangel-skaja, kiu estas konstruita super la rivero kaj vespere longatempe brilas per siaj kvin arĝentaj kupoloj.

— Ŝi loĝis proksime de la katedralo, diris enpenŝiginte Natalio Petrovna — apud la granda butikoj de Afansiev, el kie ĉiam tiel bonguste odoris salitaj fungoj kaj fiŝetoj. Dum la milito ŝi edziniĝis kun la filo de Afanasiev, kiu estis voj-inĝeniero. Sed ilia nupto ne estis feliĉa. Valentino forkuris kun unu kavaleria oficiro, poste proksimiĝis kun unu aktoro, fariĝis mem aktorino kaj forperdiĝis ie tra la profunda provinco.

Lesurski levigis manon kaj karesis sian frunton.

— Do tiel finis ŝi, elparolis li per obtuza voĉo. Ĉu vi ne estas aŭdinta, kio okazis al ŝi pli poste?

Natalio Petrovna streĉe kuntiris brovojn kaj respondis malcerte:

— Ŝajnas al mi, iu rakontis al mi, ke ŝi estis en Serbujo kaj kantis en ia kabaredo. Lesurski elsopiris peze kaj enverŝis konjakon en la glasetojn.

— Kaj tamen kia ŝi estis — eta kaj

delikata, diris li, ĉu vi memoras? Oni ne kuraĝis eĉ per penso ŝin tuŝi. Mi rememoras, kiom mi suferis iun tagon, ĉar, ĉe unu renkonto mi ne povis deŝiri mian rigardon for de ŝiaj lipoj. Ili similis al du sukoplenaj ĉerizoj.

— Jes, jes, respondeĥis distrite Natalio Petrovna, kvazaŭ penis diveni ion, kion ŝi ne sukcesis ekkapti.

Poste ŝi soife eltrinkis la konjakon. Lesurski verŝis al ŝi alian glason. Sed ŝi delokigis ĝin kaj diris ĉiam tiel enreviĝe:

— Mi remomoras, iun tagon mi renkontis Valentinon ĉe Filipovi. Ŝi rakontis al mi, ke estas enamiĝinta, sed ne kuraĝas konfesi sian senton. Mi priridis ŝin, ŝi ekploris kaj tra larmoj ekflustris: „malsaĝulo, malsaĝulo!“ Koleris al sia amato, ke ankaŭ li estas malkuraĝa, kiel ŝi.

— Kiam tio estis? demandis Lesurski.

— Dum la somero, kiam okazis la granda inundo.

La kapitano leviĝis kaj emociite ekpaŝis tra la ĉambro.

— Al kiu estis enamiĝinta Valentino? demandis li denove kaj ĉesigis spiradon.

— Mi ne scias, ŝi ne diris al mi, respondis Natalio Petrovna kaj levis kapon. Poste neatendite aldonis: eble, al vi . . .

Lesurski malfermis larĝe okulojn, faris tranĉan neantan geston, sed pripensis kaj diris:

— Eble . . . Kial ne, efektive. Ŝi devas esti kompreninta miajn sentojn. Sed povas esti ankaŭ ke al alia ŝi estis enamiĝinta . . . Kian signifon havas tio nun?

— Jes, nenian, respondes Natalio Petrovna.

Ambaŭ longe silentis post tio. Fine Lesurski diris:

— Kaj kion vi faros nun? Mi povas liberigi vin morgaŭ.

— Ne, rapide respondis Natalio Petrovna, pli bone ne faru tiel. Mi jam havas sperton. Sendu min laŭ staba ordo en la plej proksiman urbon. Tie mi trovos iun influhavan oficiston, kiu helpos min kaj havigos al mi la necesajn dokumentojn kaj permesojn . . . Se mi ekiros sola, estos al mi pli malfacile . . .

— Kiel vi volas, diris Lesurski.

— Lasu tiujn ĉi zorgojn! senpacience, preskaŭ abrupte diris lia gastino. Ke ni parolu ankoraŭ pri la pasinteco.

Kaj tuj komencis, rigardante antaŭ si per larĝe malfermitaj okuloj:

— Ĉi vi memoras? . . . *Trad. Miti*

Dimitâr Ŝiŝmanov, nuntempa bulgara verkisto kaj diplomato, estas konata per siaj beletristikaj kaj teatraj verkoj. Filo de niaj fervoraj samideanoj profesoro Ivan D. Ŝiŝmanov kaj Lidija Ŝiŝmanova, li naskiĝis en 1889 j. en Sofia, studis juron en Genève, estis nomita bulgara plenpotenca ministro en Athènes kaj lastatempe okupas la postenon de ĝenerala sekretario ĉe la Ministerio de l'Eksteraj aferoj en Bulgarujo. Objekto de liaj verkoj estas la superaj klasoj de la socio kaj la politikaj rondoj. Ĉefaj verkoj: La parlamentano Stojanov, novelo (1920), High-Life, novelo (1920), Ribelulo, romano (1921), Strangaj homoj, rakontoj (1924), La koŝmaro, teatraĵo (1927), La foiro en Starodol, teatraĵo (1930), k. c. Ambaŭ lastaj dramoj estis prezentitaj en la Bulgara nacia teatro.

N. d. R.

DIMCO DEBELJANOV

VANAJ REVOJ

Reveni en la patran hejmon, kiam
vesper' kviete, malrapide mortas,
kaj nokt' malfermas ame sinon sian
por ĉiuj homoj, kiuj krucon portas;

Ĵetinte for la ŝarĝon de la laco
lasitan de destino la senĝoja,
per timaj paŝoj rompi la noktpacon
de l' korto atendinta min multfoje;

sur sojlo, renkontote de patrino,
kun frunt' sur ŝia ŝultro, man' en mano,
ripozi tiel songe kaj senfine
kaj longe ripetadi: panjo, panjo . . .

eniri ĉambron karan tre humile
(por mi ja lasta revo kaj haveno)
paroli vortojn nediritajn, mildajn,
ikonon fiksi per rigard' lacplena;

rankvile ĝisatendi morton pacan,
post kiam sun' atingis vojan finon . . .

— — — — —
O, vanaj revoj de migranto laca,
songinta vane hejmon kaj patrinon . . .

El bulgara: *St. Etarski*

SOCIA VIVO

Legoj por protekto de la laboro en Bulgarujo

La unua fundamenta leĝo por la protekto, solvanta en kontentiga formo la laboristan problemon en Bulgarujo, estas la leĝo pri la laboristaj asekuroj. Kreita tuj post la mondmilito (en 1924), ĝi estis renovigita per la leĝo pri la sociaj asekuroj. En mallonga tempo ĝin sekvis kelkaj kompletigaj leĝoj celantaj la plibonigon de la materiaj kaj laboraj kondiĉoj de la bulgara laboristo. Hodiaŭ Bulgarujo staras en la vico de tiuj landoj, kiuj subskribis kaj aplikis plej grandan nombron da internaciaj konvencioj rilate al laboraj kaj sociaj problemoj. La leĝo pri higieno kaj sendanĝero de la laboro, la leĝo pri sociaj asekuroj, la asekuroj kontraŭ laborakcidentoj, la zorgoj por dungado de senlaboruloj, la leĝo pri la protekto de la metioj — jen estas la objektoj de speciala labora kaj socia politiko en nia lando.

La leĝo pri higieno kaj sendanĝero de la laboro garantias la laboristan sanon kaj la 8-horan labortagon; ĝi reguligas la dumnoktan laboron kaj pli speciale la laboron de la virinoj kaj junuloj inter 14 kaj 18-jaroj.

La leĝo pri sociaj asekuroj estas unu el la plej gravaj ĉe ni; ĝi asekuras la labo-

ristojn okaze de malsano, patrineco, maljuneco kaj morto, kaj donas rajton de senpaga kuracista helpo ankaŭ al la membroj de la familio de l' asekurito. Por la senpaga kuracado de la asekuritoj la Direkcio de la Laboro disponas en Sofia kaj en la provinco je kekelkaj hospitaloj, dispanseroj, sanatorioj, ripozo-hejmoj k. a. Sufiĉe estas nur menciitaj la moderne organizitan hospitalon „Carica Ioanna“ en Sofia, kiu posedas kelkajn klinikojn kaj 300 litojn.

La leĝo pri la dungado de intelektuloj kaj la tute nova leĝo pri la pensiuligo de la intelektaj laboristoj estas la unuaj leĝo-mezuroj ne nur en Bulgarujo, sed ankaŭ en Eŭropo.

La „Leĝo pri la kolektivaj kontraktoj“, estas unu el la lastaj akiroj de la porlaborista juro. Ĝi garantias la laboron al la laboristo, reguligas la jurajn kaj financajn rilatojn inter laboristoj kaj dungantoj, certigas la regulan elpagon de la salajro, protektas la intereson de la laboristo, neignorante tiun de la labordonanto, malpermeas strikojn kaj lock-out'ojn, definante la ŝtaton kiel solan juĝanton pri aperintaj konfliktoj.

La menciitaj akiroj, frukto de vasta

socia agado, metas Bulgarujon en la vico de la landoj havantaj la plej modernajn leĝojn. La registaro havas ĉiujn zorgojn por la plibonigo de la laborista ekzistado. Pruvo pri tio ĉi ja estas la lastaj dekretoj, laŭ kiuj la salajroj de ĉiuj laboristoj estis devige plialtigitaj per 15% kaj ĉiu laboristo rajtas 14-tagan pagitan vakancon en la jaro. Antaŭ kelkaj semajnoj la Bulgara Parlamento akceptis ankaŭ leĝon pri la pensiulado de la agrikulturistoj. La vigla kunla-

boro inter la Ministerio de la laboro, Direkcio de la Laboro, Bulgara laborista asocio kaj la privataj entreprenoj povis garantii la laboron kaj certigi la bonstaton de la bulgara laboristo.

Havante super si la zorgon de la ŝtato, la bulgara laboristo povas fieri per siaj sukcesoj, kiuj dumlonge en la pasinteco restis nur revoj.

Ciril Drajev



Esperanto-kurso 1941 — Varna, gvidata de ino M. Saralieva

APOSTOLOJ DE UNU IDEO

Levski

El la „Viva gazeto“ de la societo „Kulturo“ — Plovdiv.

Inter la sennombraj batalantoj, por nia liberiĝo dum la epoko de la jugo, digne staras la figuro de Vasil Levski. La plej granda merito de tiu-ĉi bulgara heroo estas, ke li unue bone komprenis la signifon de la revolucio por la liberigo de la popolo. Kaj li sola aplikis tiun ideon, organizante tra la tuta lando revoluciajn komitatojn kaj estiĝante ilia gvidanto. Li estis tre vigla, sperta, sentima homo kaj

pro tio oni nomis lin Levski t. e. „Leonido“.

Vasil Levski naskiĝis en la 1837 jaro en la subbalkana urbo Karlovo. Unue li lernis en sia naskiĝurbo kaj iposte en urbo Stara-Zagora. Li arde deziris daŭrigi sian studadon en Rusujo, kie tiutempe studis multaj bulgaroj, sed tiun revon li ne povis realigi pro sia malriĉeco. Post la fino de la unuagrada lernado, laŭ la deziro de sia

patrino Vasil komencis labori ĉe sia onklo, kiu estis monako. Tie Levski restis 12 jarojn kaj eĉ estiĝis diakono. Sed li ne povis plu toleri tian situacion, ĉar li estis naskita por libero kaj batalo. Vidante ankaŭ la malbonajn aferojn de sia onklo, li forkuris de li. De nun komenciĝas la vera vivo de Levski, vivo por la libero kaj por pli bona stato de la bulgara popolo.

Unue li partoprenas la ĵus formitan (en 1862) en Belgrad bulgaran legion kiu baldaŭ disfalas. Tiam Levski revenis en Bulgarujon kaj estiĝis instruisto. Post nelonga tempo li eksciis, ke trans Danubo, en Rumanujo, kolektiĝas revoluciemaj bulgaroj, kaj tuj veturis al ili. Tie formiĝis la legio de alia revoluciano, Panajot Hitov, kaj Levski okupis en ĝi la gravan rolon de flagportisto. Tiu ĉi bando transiris en Bulgarujon kaj tre longe bataladis kontraŭ la turkoj. Sed baldaŭ Levski konvinkinĝis ke tiaj legioj povos neniam liberigi la popolon. Li komprenis, ke *unue la tuta popolo devas esti organizita kaj preparita en potenca movado* por komuna, kolektiva akcio, kaj tiam el si mem venos la libero. Tiel Levski estiĝis ĉef-gvidanto de multnombraj revolu-

ciaj komitatoj, kiuj baldaŭ kovris la tutan landon. Li estis adorata de la junuloj, kiuj deziris vidi fine la liberan Bulgarujon. Sed la turka registaro komprenis baldaŭ lian laboron kaj komencis persekuti lin. Post sepjara fruktodona laboro inter la popolo fine Levski estis kaptita kaj la registraro pendigis lin apud Sofia la 18-an de februaro 1873.

Tiel mortis en gloro unu el la plej grandaj filoj de la bulgara popolo, la organizanto de la nacia revolucia movado en Bulgarujo.

Hr. Dim. Arsenov

La kontraŭloj asertas

ke la internacia lingvo, antaŭ ol disvastiĝi tra la tuta mondo, tiom aliiĝus, ke oni ne plu rekonus la originan lingvon. Tiu ĉi aserto memorigas pri la bravaj ekspertoj kiuj pruvis la neeblecon de la fervojo, kiam ĝi jam du jarojn funkciis. Aŭ pri tiuj aliaj, kiuj, aŭskultinte gramofonon, la novan inventon de Edison, asertis ke oni trompis ilin per lerta ventroparolisto. La internacia lingvo jam disvastiĝis tra la mondo, kaj ĉie unu esperantisto bonege komprenas la alian.

PANTEONO DE LA VETERANOJ

Georgi Atanasov

Georgi Atanasov estas naskita en urbo ova-Zagora, la 24-an de Decembro (novstilo), 1880 j. Li komencis lerni Esperanton en 1899 j. Post sesmonata korespondado kun alilandaj esperantistoj, li partoprenis, per la rakonto „Avo Joco rigardas“ de Ivan Vazov, la literaturan konkurson, aranĝitan tiutempe de la Franca Esperantista Societo, kaj ricevis la trian premion. De tiu tempo li komencas fervore propagandi Esperanton. Li, kune kun s-ro Georgi Oreškov, fondis kaj redaktis la unuan ilustritan esperantan revuon „Rondiranto“. Ĝis la 1904 jaro li gvidis kelkajn kursojn esperantajn en

Plovdiv, Burgas kaj Varna. En Varna li estis unu el la fondintoj de la esperantista klubo „Frateco“, kies honora membro fariĝis en 1905 j.. Krome, li kune kun G. Oreškov tradukis la esperantan lernolibron de T. Cart: „Unuaj lecionoj“, la Universalan vortaron de D-ro Zamenhof kaj la broŝuron de L. de Beaufront „Esperanto, la sola vera solvo de la lingvo internacia helpanta“. Je la fino de 1904 j. li forveturis Praha'n (Bohemujo) dank' al Esperanto kaj tie li studis muzikon en la tiea muzika akademio. En la esperantista klubo de Praha li prelegis pri „La esperanta propagando en Bulgarujo“. Post la

fino de la muzika studado li revenis Bulgarujon kaj denove komencis sian esperantan agadon. En Sofia li gvidis esperantajn kursojn kaj fariĝis delegito de Universala Esperanto Asocio (U. E. A.). Samtempe li partoprenis la fondon de la Bulgara Esperantista Asocio kaj de la re-



vuo „Bulgara esperantisto“, inter kies redaktoroj estis ankaŭ li. En 1910 j. li fariĝis kunredaktoro de „Danubo“, organo de la bulgaraj kaj rumanaj espe-

rantistoj. Li ricevis ankaŭ „Ateston pri kapableco“ de la Ĝeneva ekzamena instituto, kiu donis al li rajton ekzameni kandidatojn, kiuj volas esti lektoroj de esperantaj kursoj. Antaŭ la Balkana milito li verkis la esperantajn muzikaĵojn por piano: „Koraj sonoj“ (mazurko) kaj „Printempaj sonoj“ (polko), eldonitaj de la Pariza muzika eldonejo Besnard. Post la granda eŭropa milito li aranĝis la esperantistan himnon de barono de Ménil por amatoraj ĥoroj. En tiu tempo la esperantista firmao G. Gaŝevski reeldonis lian tradukon de „Uniaj lecionaj“ kaj eldonis ankaŭ la „Bulgarajn rakontojn“ de Ivan Vazov kaj la „Ŝlosilon“ de Ĉefeĉ, ambaŭ tradukitaj de Atanasov.

Antaŭ kelkaj jaroj li komencis verki sian plenan bulgaro-esperantan vortaron kaj ĝin finis en 1937 j. Pro la malfavoraj cirkonstancoj tamen ĝi ankoraŭ ne estas eldonita.

Antaŭ 2 jaroj la eldonista firmao St. Atanasov eldonis lian lernolibron „Esperanto en 10 lecionoj“ laŭ T. Cart, tamen modernigita laŭ la novaj pedagogiaj metodoj. Li kolektis ankaŭ multajn anekdotojn el la vivo de Nastradin-hoĝa kaj Ruza Petro kaj rerakontis ilin en Esperanto. Ili ankaŭ atendas sian eldoniston.

VIZITU BULGARUJON!

Mineralakvaj fontoj en Bulgarujo

Krom per multaj aliaj riĉaĵoj, la naturo dotis Bulgarujon ankaŭ per granda nombro da mineralakvaj fontoj. La varieco de l'akvoj estas granda kompare al la tre malvasta teritorio de la lando.

Laŭ la ĝisnunaj esploroj, en Bulgarujo ekzistas mineralakvoj en 136 lokoj. En iuj regionoj la mineralakvaj fontoj atingas la nombron 14 ĝis 30.

La temperaturo de la fontoj estas inter 19° kaj 82°C. Tre varia estas ankaŭ ilia radioemano: ĝi atingas de 1'1 ĝis 582, respektive 1100 emanaj unuoj.

El ĉiuj 136 mineralfontoj nun estas

ekspluatataj por kuracado, banado, trinkakvo k. a. nur 57. La ceteraj, pro manko de rimedoj por konstruo de banejoj, restas ankoraŭ ne ekspluatataj.

Ni mencias ĉi tie nur la banejojn kun modernaj aranĝoj: bankonstruaĵoj, hoteloj, vilaoj kaj bonaj komunikiloj.

Oni devas rimarki ke preskaŭ ĉiuj mineralfontoj troviĝas meze de ĉarma naturo kaj prezentas samtempe bonegajn kuraĉlokojn, kie la akvokuracado estas kompletigata per agrabla montaraero, kiu refreŝigas kaj vigligas la organismon.

Bankja.

La mineralfontoj de Banki troviĝas je 17 klm. s-okcidente de Sofia, inter la nordaj deklivoj de Ljulin-planina. Ili estis konataj jam en la epoko de la Roma regado sur la Balkano. Ĝis antaŭ 20 jaroj tiuj kuracfontoj estis tre primitive ekspluatataj, sed ilia valoro estis baldaŭ rekonita kaj la malgranda modesta vilaĝo Banki fariĝis moderna Eŭropea kuracloko. Tie nun staras belega bankonstruaĵo. Per siaj ecoj la mineralakvo de Banki konkuras la plej konatajn banejojn de Eŭropo.

Ĉarmaj parkoj, belegaj vilaoj kaj ĉirkŭaĵoj vicigas tiun ĉi banlokon inter la unuajn kuraclokojn de Bulgarujo, kaj oni kutimas nomi ĝin la „Reĝa banejo“. La proksimeco de Sofia kaj la tre oportunaj kaj malkaraj komunikiloj pliiĝas ĝian valoron. La sezono daŭras de la 1. de junio ĝis la 1. de novembro.

La akvo de Banki estas klara, senkolora, kun agrabla gusto. Ĝi apartenas al la grupo de varmaj akvoj kun malmulta mineraleco. Ĝia temperaturo en basenoj estas 37.2°C. Trinkate, la akvo kuracas ĉiujn malsanojn de neregula metabolismo.

Vârșec.

En Vârșec ekzistas feliĉa kombino de kuracaj mineralfontoj kun ĉarma saniga klimato kaj rava naturo. Tiu ĉi akvokuraca stacio estas plej multe vizitata de eksterlandanoj. Ĝi estas la dua bulgara klimata stacio post Varna — reĝino de la Nigra maro.

Vârșec troviĝas en unu paradiza intermonto, apud la deklivoj de l'okcidenta Stara-planina, 32 klm. okcidente de la distrikta urbo Vraca.

Per siaj modernaj konstruaĵoj Vârșec konkuras multajn mondkonatajn okcidenteŭropajn kuraclokojn, kaj eĉ superas ilin dank'al siaj naturbelaĵoj kaj malkara vivo. Tia kombino de agrabla klimato, turistaj eblecoj, vastvidaĵoj kaj mineralakvoj estas malofte renkonteblaj.

La sezono daŭras de l' 1 junio ĝis la 15 de oktobro.

Ekzistas du mineralfontoj ĉe Vârșec: varma (35°C) kaj modera (32°C). La akvo de ambaŭ estas klara, senkolora, senodora kun eta alkala gusto. Malsanoj kuracataj: virinaj seksmalsanoj, seksa malforteco, reŭmatismo, podagro k. a. Radioemano: 15.6 emanunuoj.

Hisar.

La banejoj de la Romaj imperiestroj

Je 42 klm. sudoriente de Plovdiv kaj 16 klm. de Karlovo (montarurbeto meze de Rozvalo) inter la deklivoj de Srednagora (Meza montaro) troviĝas la famaj Hisar-banejoj.

Ilia kuracforto estas fama depost multaj jarcentoj. Tien ĉi venadis vizitantoj el ĉiuj partoj de Balkana duoninsulo por kuraci sin. La Romaj imperiestroj konstruis nealireblan fortikaĵon por ŝirmi la fontojn kontraŭ la atakoj. Eĉ nun oni vidas konservitajn murojn de romaj fortikaĵoj, kiuj ĉirkaŭas Hisaron.

La famo de Hisar-banejo delonge transiris la limojn de Bulgarujo. La nombro de fremduloj, kiuj vizitas ĝin, kreskas de jaro al jaro. Kaj hodiaŭ Hisar estas tute moderna eŭropa kuracloko kun ĉiuj komfortoj, distraĵoj kaj ecoj de granda kuraca centro.

La kuracsezono daŭras de l' 1 de junio ĝis la 1 de novembro.

Ekzistas multaj mineralfontoj, sed nur 7 estas ekspluatataj racie kaj moderne. Inter ili Momina banja (Knabina banejo) estas unu el la plej radioemanaj (114 kjurioj) kun 46.5°C varmeco de la akvo. La modernaj konstruaĵoj por banejoj estas provizitaj per ĉiuj postuloj de la moderna hidroterapio. Trinkate, la akvo de Momina banja kuracas ŝtonojn de reno aŭ de hepato kaj stomakkataron.

En Hisar-banejo oni povas praktiki ankaŭ, paralele kun la mineralakva kuracado, vinberkuracadon. Dum la sezono abundas la vinberoj kaj aliaj fruktoj.

NIA VIVO

Statistika servo de l'Esperanto-movado

Por la reorganizo, laŭ scienca metodo, de la Esperanto-movado en nia lando kaj por la pliraciigo de la propaganda laboro, la BEA bezonas kiel eble plej multe da informoj pri la nombro de niaj samideanoj kaj amikoj, pri la nomoj, adresoj kaj aliaj statistikaj detaloj koncerne al la esperantistoj aŭ simpatiantoj el ĉiuj lokoj de Bulgarujo. Pro tio ni fondis specialan statistikan servon de la Esperanto-movado, prizorgatan de nia malnova samideano D-ro Cvetan Stajkov.

Ĉiuj samideanoj do estas plej insiste petataj kolekti en sia loko (urbo, vilaĝo, regiono, departemento aŭ distrikto) kiel eble plej grandan nombron da adresoj kaj koncizaj statistikaj informoj pri novaj aŭ malnovaj esperantistoj — organizitaj aŭ ne—pri personoj kiuj komencis, sed ne sukcesis ellerni Esperanton, aŭ kiuj forgesis ĝin kaj deflankiĝis de la movado, ankaŭ pri personoj kiuj ankoraŭ ne lernis ĝin, sed simpatias nian ideon kaj *efektive* interesiĝas pri nia lingvo, t. e. *esprimis* deziron ĝin lerni, eventuale aĉetis lernolibron, vizitis propagandan kunvenon, k. c.

Ĉion sendu al: D-ro Cvetan Stajkov asistento ĉe l'Universitato, Bul. Bauĉer 24 Sofia.

La kontraŭuoj asertas, ke Esperanto estas taŭga rimedo por disvastigo de kontraŭŝtataj ideoj en Bulgarujo, kaj pro tio ĝi devas esti malpermesita. Tiuj sinjoroj forgesas, ke la kontraŭŝtatuloj utiligas precipe la bulgaran lingvon por sia propagando. Ĉu pro tio ni devas malpermesi la bulgaran lingvon en Bulgarujo?

„BULGARA ESPERANTISTO“ —
monata organo de la Bulg. Esp. Asocio.
Adreso: 20, str. Car Kalojan, Sofia, Bulgarujo. Poŝtĉekkonto: 1133

ПЕЧАТНИЦА „ХУДОЖНИКЪ“ — СОФИЯ

La redakcio petas.

Ni petas ĉiujn societojn kaj apartajn samideanojn komuniki al la redakcio de Bulgara Esperantisto ĉiuspecajn novaĵojn el la esperantista vivo en iliaj urboj aŭ vilaĝoj. Informu nin ne nur pri la okazaĵoj en la societoj, grupoj, kunvenoj, kursoj ktp., sed ankaŭ pri diversaj sciindaĵoj el la privata vivo de la esperantistoj: fianĉiĝoj, edziĝoj, naskiĝoj, oficigoj, plialtigoj de postenoj, ktp.

Niaj legantoj dezirus scii kio okazas en ilia „granda rondo familia“. Tiamaniere plifortikiĝos la solidareco inter ĝiaj membroj.

Literatura konkurso

La redakcio de la Mura gazeto, aranĝata ĉe la Esperanto-domo en Sofia, organizas literaturan konkurson por originala verko en Esperanto: artikolo, poemo aŭ rakonto. Templimo: 30. de julio 1941. Premio: jarabono por „Bulgara Esperantisto“ kaj publikigo en la sama gazeto kun speciala mencio. Adreso: Stojan Vasiliev, ul. Kukuŝ n-ro 1, Krasno selo, apud Sofia.

Deziras korespondi:

● S-ro K. Vegys, Uauknskuiu km. Biržai Litovio. S.S.S.R.

● S-ro G. Thomas — Poste restante. Soval (Tarn). Franclando, muzikisto, 35 jara, deziras korespondi kun 30-jara esperantistino pri muziko literaturo, kutimoj ktp.

● S-ro Jovĉo Ivanov, elektro-muntisto, Ĉirpan. Bulgarujo, deziras korespondi kun gesamideanoj pri diversaj temoj. Tuj respondas.

JARABONO: Enlande — 20 bulg. levoj. Eksterlande — 4 respondkuponoj aŭ egalvaloro.

Anoncoj: 1 kv. cm. — 1 levon

RESP. REDAKTORO: P. JORDANOV

ESPERANTO-PRESEJO „ХУДОЖНИК“ — СОФИЯ-2